

KONTRIBUO DE LA RUSA LINGVO AL LA FORMIĜO KAJ EVOLUO DE ESPERANTO  
 Referaĵo de la disertacio, defendita en la 1985 jaro

La referata disertacio estas dediĉita al la rolo de la rusa lingvo en la formiĝo kaj evoluo de la internacia helpa lingvo Esperanto kaj estas la unua provo analizi tiun problemon laŭ ĉiuj niveloj de la lingvo.

La aktualeco de la esploro. Unu el la distingaj signoj de la nuntempa lingvistiko estas emfaza atento al la problemoj de la konverĝo: lingvaj kontaktoj, reciproka influo de la lingvoj, internacia leksika stoko. El tio rezultas la intereso al la rusa lingvo en la rolo de la lingvo de interpopola komuniĝo en Sovet-Unio kaj en la rolo de unu el la mondlingvoj, ankaŭ al ĝia benefika influo rilate al evoluo de aliaj lingvoj. En nia tempo altiĝas intereso ankaŭ al la problemoj de interrilato de la spontana kaj la konscia en la lingvo, lingva planado, terminologio, artefaritaj lingvoj. Tiu ĉi esploro estis farata konforme al la menciitaj supre direktoj kaj baziĝas sur atingoj de la moderna interlingvistiko.

La funkciantaj artefaritaj (planitaj) internaciaj lingvoj meritas atenton de la lingvoscienco, ĉar "studado de principaj demandoj de strukturo de helpaj lingvoj estas, esence, studado de la plej esencaj problemoj de la lingvistiko ĝenerale"<sup>1</sup>. Pri problemoj de la internacia planlingvo okupiĝis kaj okupiĝas enlande kaj eksterlande multaj lingvistoj. La artefarita helpa lingvo estis objekto de pridiskuto en la 2-a kaj 6-a internaciaj kongresoj de lingvistoj. Al problemoj de la interlingvistiko estas dediĉitaj multe da studoj, pri ili estas defendataj disertacioj.

Rusio kaj Sovet-Unio estas famaj pri siaj interlingvistikaj tradicioj. Ĝi estis naskiĝlando de du vaste konataj lingvo-projektoj Esperanto kaj Idiom-Neutral. Tie ĉi vivis elstaraj interlingvistoj: L.M. Zamenhof, V.K. Rosenberger, E. von Wahl, I.A. Baudouin de Courtenay, E.K. Drezen, E.A. Bokarjov.

Nuntempe en la Lingvistika instituto sub la Scienc-akademio de USSR funkcias sub gvido de prof. M.I. Isajev problema Interlingvistika grupo, kiu pridiskutas aktualajn problemojn, preparas artikolarojn kaj havas aspiranturon (postdiplomana sciencan studadon). Estas eldonita universitata lernolibro pri la interlingvistiko de S.N. Kuznecov. En la lastaj jaroj en kelkaj universitatoj de Sovet-Unio estis prelegataj kursoj de interlingvi-

stiko. La Tartu-a universitato eldonas sub gvido de prof. A.D. Duliĉenko artikolarojn pri la interlingvistiko.

Malgraŭ la relative alta evolu-nivelo de la interlingvistiko, fakuloj atentigas pri nesufiĉa studo pri interrilatoj de planitaj kaj naciaj lingvoj. La problemo pri kontribuo de slavaj lingvoj, kaj aparte de la rusa, al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto restas unu el la plej neprilaboritaj kampoj en la interlingvistiko. Al ĝi estas dediĉitaj nur kelkaj fakaj artikoloj<sup>2</sup>, kiuj kontribuis al plenumo de la taskoj de tiu ĉi esploro.

La noveco de la esploro. Ĝis nun ekzistis ĝenerala opinio, ke Esperanto baziĝas ĉefe sur elementoj de okcident-eŭropaj lingvoj. Rezulte de la farita esploro estas farita jena ĉefa konkludo: Esperanto estas funkcianta lingvo, kreita el elementoj de la internacia stoko de la mondlingvoj de Eŭropo, selektitaj laŭeble en la formo, kiun ili ricevis en la rusa lingvo, kun konsiderinda senpera kontribuo de la rusa lingvo al ĉiuj lingvoniveletoj, precipe en la fonologion, leksikan kaj derivacian semantikon, vortfaradajn, morfologiajn kaj sintaksajn modelojn.

La esploro baziĝas sur jenaj tezoj:

1. La karaktero de depruntado en la planlingvo diferencas de tiu en la etnolingvo: la unua orientiĝas al la internacieco, la dua - ne ĉiam. Tial la Esperanta vorto plej ofte estas mezigitita invariante de vortoj-modeloj, proksimaj laŭ formo kaj semantiko, t.e. la vortoj estas depruntataj en Esperanton, se ili estas rekoneblaj por la portantoj de kiel eble plej granda nombro da lingvoj - fontoj de la internacia stoko, kiuj estas samtempe ĉefaj lingvofontoj de Esperanto.

2. Kiel kontribuo de la naciaj lingvoj al la planlingvo Esperanto tie ĉi estas komprenata la geneza kaj geneza-tipologia komuneco de Esperanto kun ĝiaj lingvofontoj. Kiel geneza komuneco estas komprenata konscia selekto de elementoj kaj modeloj. Kiel geneza-tipologia komuneco estas subkomprenataj similaj fenomenoj, kiam pri la konscia selekto mankas evidentaj pruvoj. Plej ofte ili baziĝas sur la interferenco, fariĝinta fakto de la lingvo. En la planlingvo tiuj specoj de komuneco estas malfacile diferenceblaj.

3. En tiu ĉi studo estas analizata nur la kontribuo de la rusa lingvo, kaj ne ĉiam estas atentigite, ke tiu aŭ alia struktur-elemento povas havi samtempe analogojn ankaŭ en aliaj lingvoj. Ĉiu vorto, uzata en la rusa parolo, estas konsiderata de ni kiel vorto de la rusa lingvo, sendepende de ĝia origino kaj uzosfero.

4. Dum analizo de leksika komuneco de Esperanto kaj la rusa lingvo en tiu ĉi studo estas konsiderita ne la tuta leksika korpuso de Esperanto, sed nur ĝia kerno - la tavolo de la plej uzata leksiko.

La ĉefaj konkludaj tezoj de la esploro:

1. Esperanto, dank' al daŭra uzado en la granda internacia kolektivo, transformiĝis en memorganizigantan sistemon, principe proksiman al la memorganizigantaj sistemoj de la vivantaj etnaj lingvoj.

2. La geneza komuneco de Esperanto kun ĝiaj lingvofontoj signifas, ke Esperanto estas konscie kreita sur ilia bazo, sed ne estas nova ŝtupo en la procezo de ilia spontana evoluo. Tiu komuneco estas komparebla kun la rilato de la etna lingvo al la lingvoj - fontoj de ĝiaj depruntoj. Aliflanke, Esperanto ne estas muldaĵo de la lingvofontoj, sed posedas originalan strukturon, permesantan al ĝi evolui aŭtonome, laŭ propraj tendencoj.

3. La kontribuo de la rusa lingvo al ĉiuj niveloj de la strukturo de Esperanto estas tre konsiderinda, el kio rezultas struktura proksimeco de la du lingvoj. Tiu kontribuo manifestiĝis per selekto de elementoj tiel senpere el la rusa lingvo, kiel el la internacia stoko en tiu formo, kiel ili reflektiĝis en la rusa lingvo.

4. La komuneco de Esperanto kun la rusa lingvo en la tavolo de la plej uzata leksiko, laŭ niaj observoj, faras 58,8%. La influo de la rusa lingvo al la semantiko kaj frazeologio de Esperanto ankaŭ estas evidenta, kvankam malfacile mezurebla.

5. En la procezo de evoluo de Esperanto estas observata la tendenco al eŭropeca meziĝo de formoj kaj al eliro el uzo de derivaĵoj kaj kunmetaĵoj, karakteriziĝantaj per konsiderinda idiomeco, precipe de tiuj, kiuj venis sub influo de la rusa lingvo en la periodo de formiĝo de Esperanto.

La materialoj de la esploro. La ĉefaj verkoj, sur kiuj baziĝas la disertacia verko:

1. La plej gravaj enlandaj studoj pri la interlingvistiko de I.A. Baudouin de Courtenay, E.A. Bokarjov, V.P. Grigorjev, E.K. Drezin, A.D. Duliĉenko, M.I. Isajev, S.N. Kuznecov.

2. La fundamentaj esperantologiaj verkoj: "Plena analiza gramatiko de Esperanto", "Plena ilustrita vortaro de Esperanto", "Naŭlingva etimologia leksikono", "Baza radikaro oficiala", "Esperanta-rusa vortaro" de E.A. Bokarjov, "Rusa-esperanta vortaro" redaktita de E.A. Bokarjov, "Plena verkaro" de L.L. Zamenhof.

3. "Rusa gramatiko", volumoj I kaj 2.

4. La supre menciitaj verkoj de M. Duc Goninaz, D. Gregor kaj V. dall' Acqua, proksimaj al la temo de la disertacio.

La ceteraj verkoj estas indikitaj en la listo de literaturo, kiu entenas 253 fontojn.

La strukturo de la disertacio. La disertacio konsistas el enkonduko, tri esploraj ĉapitroj, ~~post~~ postparolo kaj listo de la uzita literaturo.

En la unua ĉapitro estas konsiderata la problemaro de la interlingvistiko, estas esplorataj strukturaj principoj de Esperanto kaj socialaj kondiĉoj de la efiko de la rusa lingvo al la procezo de formiĝo kaj evoluo de Esperanto.

En la dua ĉapitro estas sisteme priskribata la kontribuo de la rusa lingvo al ĉiuj niveloj de la gramatika strukturo de Esperanto.

La tria ĉapitro estas dediĉita al la karakterizo de la kontribuo de la rusa lingvo al la leksiko, semantiko kaj frazeologio de Esperanto.

#### LA ENHAVO DE LA VERKO

La unua ĉapitro "Ĝeneralaj teoriaj demandoj de la interlingvistiko lige kun la formiĝo kaj evoluo de Esperanto" komenciĝas per difino de la interlingvistiko kaj per prezento de ĝiaj struktureroj. Aspiro venki la lingvan baron rezultigis kreon de centoj da projektoj de la internacia helpa planlingvo. Estas notinde, ke la eblecon mem de la konscia lingvokreado antaŭvidis ankoraŭ K. Marx kaj F. Engels, kiuj skribis: "Ke la individuoj siatempe prenos ankaŭ tiun produkton de la specio sub sian regon, kompreniĝas el si mem"<sup>3</sup>. La vojon ekde la projekto de planlingvo al ĝia realiĝo en la socia praktiko sukcesis trairi nur kelkaj sistemoj, sed nur unu el ili - Esperanto - fariĝis multfunkcia lingvo.

La interlingvistiko estas fako de la lingvistiko, esploranta la strukturon de la internaciaj planlingvoj kaj ankaŭ funkciadon de la naciaj kaj planitaj lingvoj en la sistemo de la internacia komuniĝo. La interlingvistiko troviĝas ĉe la kruciĝo de du vastaj sferoj de la homa aktivico. La unuan oni povas nomi "la internacia en la lingvo kaj en la socio", la duan - "la konstrua semiotiko", kiu inkluzivas kreon kaj studon de signaj sistemoj, lingvan planadon, literaturan kaj terminologian prilaboron de la lingvo. El tio sekvas vastaj ligoj de la interlingvistiko kun multaj sciencoj kaj aliaj specoj de homa aktiveco.

Necesas distingi la ĝeneralan interlingvistikon de la speciala, la internan de la ekstera, la sinkronan de la diakrona. El tio rezultas ok fakoj de la interlingvistiko: 1) ekstera ĝenerala sinkrona (monda lingva situacio, multlingveco kaj la vojoj de venko de la lingva baro, interrilato de la spontana kaj la konscia en la lingvo, tipoj de la internacia lingvo, internacia lingva stoko, ĝeneraligo de la sperto pri funkciado de la internaciaj lingvoj); 2) ekstera speciala sinkrona (funkciado de apartaj internaciaj lingvoj); 3) ekstera ĝenerala diakrona (dinamiko de la monda lingva situacio, prognozado de la monda lingva situacio - proksima kaj malproksima, evoluo de la ideo de la internacia lingvo); 4) ekstera speciala diakrona (historio de la apero, disvastigo kaj funkciado de apartaj internaciaj lingvoj); 5) interna ĝenerala sinkrona (esploro de naciaj lingvoj cele al malkovro de la internacia stoko kaj de elementoj por konstruo de planlingvoj, ellaboro de ĝeneralaj principoj de lingvoprojektado, ĝenerala komunikada teorio de planlingvoj, tipologio de planlingvoj, konfronto de naciaj kaj planitaj lingvoj, konfronto de planitaj lingvoj); 6) interna speciala sinkrona (projekta kaj komunikada teorio de apartaj planlingvoj, unuavice, de Esperanto); 7) interna ĝenerala diakrona (konfronto de la strukturo de planlingvoj laŭ ilia aperado); 8) interna speciala diakrona (evoluo de Esperanto).

La demandoj, koncernantaj la studadon de planlingvoj, unuiĝas en la plej ĉefan subbranĉon de la interlingvistiko - planlingvistiko. Tipologie la planlingvoj dividiĝas en apriorajn (ne bazitajn sur naciaj lingvoj), aposteriorajn (bazitajn sur elementoj de naciaj lingvoj) kaj miksitaj. Siavice, la aposterioraj lingvoj dividiĝas en aŭtonomajn (en kiuj dominas la principo de reguleco, kaj la principo de internacieco rilatas ĉefe kun la nivelo de morfemoj) kaj en naturalismajn (en kiuj dominas la principo de la internacieco sur la nivelo de vortoj damaĝe al la principo de reguleco).

La aposteriora aŭtonoma lingvo Esperanto karakteriziĝas per sukcesa kombiniĝo de du malfacile kongrueblaj principoj: internacieco kaj reguleco. Ĝi estas bazita sur internaciaj elementoj de la mondlingvoj de la eŭropa areo: franca, angla, germana kaj rusa. Tamen la izoglosoj ne ĉiam trairas ĉiujn ĉi lingvojn. Tial en la formiĝo de Esperanto la rusa lingvo ludis la rolon de la decida kontrola lingvo: en Esperanton eniris unuavice tiuj eŭropismoj, kiuj iĝis elementoj de la rusa lingvo, kaj plej ofte en

la formo, kiun ili akiris en la rusa lingvo. Tiun gravan rolon la rusa lingvo ludis, inter alie, dank' al tia sia avantaĝo kompare kun la aliaj mondlingvoj de Eŭropo, kiel proksimeco de la ortoepiaj kaj ortografiaj normoj. Se por signi iujn nociojn mankis absolutaj internaciismoj, do estis prenataj elementoj, ekzistantaj en du aŭ en unu lingva grupo aŭ eĉ en unu lingvo.

■

En okazoj de bezono en Esperanto la principo de internacieco estas oferata al la principo de reguleco, kiu ebligas redukti la lingvon al negranda aro da originaj elementoj kun simplaj reguloj de ilia kombinado. Plej ofte temas pri tio, kio nomiĝas plenigo de malplenaj ĉeloj: iuj elementoj de naciaj lingvoj estas prenataj kiel bazo por la modelo, kiu etendiĝas sur ĉiujn analogiajn elementojn de la lingvo senescepte. La preskaŭ senlima plenebleco de la modeloj en la substrukturoj de la lingvo ebligis al Esperanto iĝi aŭtonoma, t.e. sendependa de aliaj lingvoj, kaj tre riĉa je derivaĵoj pro tio, ke sur la eblecojn de la kombinkapablo metiĝas, ĉefe, semantikaj limigoj. Ĝi preskaŭ ne metiĝas limigoj, postulataj de la komuna uzado.

La kreinto de la fundamento de Esperanto Lazar Markoviĉ Zamenhof naskiĝis kaj travivis la tutan vivon sur la teritorio de Rusio. Ellaborante la projekton de sia planlingvo, li, konscie aŭ subkonscie, subiĝis influon de la rusa lingvo. Tio klariĝas ne nur per tio, ke ĝi estis por li gepatra lingvo, sed ankaŭ per tio, ke Zamenhof konsciis elstarajn ecojn de la rusa lingvo. Do ne estas surpriza la aforismeca eldiro de la brita esperantologo D. Gregor pri tio, ke en Esperanto malantaŭ la latina fasado kuŝas la slava mekanismo. Estas notinde, ke adeptoj de aliaj planlingvoj kritikis Esperanton pro ĝia rusa ingredienco.

La unuajn jarojn Esperanto disvastiĝis preskaŭ ekskluzive en Rusio. Lige kun tio, la periodo de Esperanto-movado 1887-1900 jaroj ricevis la nomon de la rusa periodo. Sufiĉas diri, ke en la unua adresaro de la personoj lernintaj Esperanton, el 1000 personoj 919 estis Rusianoj. La unuaj Esperantaj verkistoj kaj tradukistoj estis same ĉefe el Rusio. Ili, sekvante Zamenhofon, precizigadis la modelojn kaj principojn de la vortfarado, frazeologio, sintakso, stilistiko de Esperanto, influis la stabiliĝon de la vorta semantiko. La plej bonaj verkoj de la unuaj jaroj estis redaktitaj de Zamenhof mem kaj eldonitaj en la 1903 jaro en formo de libro titolita "Fundamenta krestomatio" kiel modelo de la Esperanta normo. Kiam la centro de la Esperanto-movado

sub influo de malfavoraj cirkonstancoj, formiĝintaj en la cara Rusio, translokiĝis en Okcidentan Eŭropon, la ĉefaj normoj de Esperanto jam stabiliĝis kaj plu influadis la komunan uzadon, kaj okcidentaj aŭtoroj, ne sciantaj la rusan lingvon, uzadis modelojn, venintajn el la rusa lingvo.

Nova progreso de Esperanto-movado en Sovet-Unio okazis en la 20-30-aj jaroj, kiam ĝi akiris rekonon de la socio lige kun vasta apliko de la lingvo por la celoj de la klasbatalo kaj informado pri la unua en la mondo socialisma ŝtato. Same kiel la unua mondmilito, la dua mondmilito pereige efikis sur la Esperanto-movadon, kiu malprogresis. Kun ekregado de la paco kaj kun firmiĝo de internaciaj kontaktoj sur ĉiuj niveloj - ŝtata, socia, persona - renaskiĝis la Esperanto-movado tiel en la mondo, kiel en Sovet-Unio. Tio rezultigis meze de la 50-aj jaroj aperon de multaj esperantistaj kluboj kaj rondoj en Sovet-Unio. La ĉefaj sferoj de apliko de Esperanto en la nova periodo por sovetiaj esperantistoj iĝis pambatalo, internaciaj kontaktoj, propagando de ekonomiaj, kulturaj kaj socialaj atingoj de la sovetiaj popoloj inter eksterlandaj esperantistoj, kaj ankaŭ apliko de Esperanto en la internacisma edukado. La konsiderinda plivastiĝo de la Esperanto-movado en USSR rezultigis kreiĝon en 1979 jaro de Asocio de sovetiaj esperantistoj (ASE), kiu funkcias sub protekto de Unuiĝo de sovetiaj societoj por amikeco kaj kulura ligo kun eksterlando (SSOD), profesiaj sindikatoj kaj komsomolo. Aperis novaj ruslingvaj aŭtoroj kaj tradukistoj, kio ne povis ne reflektiĝi en vortuzado kaj stilistiko de Esperanto.

Kvankam la kontribuo de la rusa lingvo al la materiala bazo de Esperanto (vortoj, morfemoj) ne estas okulfrapa, la analizo de korpuso de Esperanto ebligas ĝin riveli. Ĝi estas rezulto de la geneza kaj geneza-tipologia komuneco de ~~la~~ la du lingvoj. Influo de la rusa lingvo al Esperanto neniam ĉesis, kvankam ĝi estis diversa en diversaj periodoj de la evoluo de Esperanto kaj de Esperanto-movado, rekte aŭ nerekte ligitaj kun la socia evoluo. Precipe forta ĝi estis en la periodo de la formiĝo de Esperanto kaj poste en la 20-30-aj jaroj.

En la unua ĉapitro estas ekzamenitaj ankaŭ demandoj, ligitaj kun la evoluo de Esperanto. Kiel konate, la vivanta lingvo estas siaspeca memorganizanta sistemo, kiu karakteriziĝas per relativa memstareco. En ĉiu momento, la lingvo, realiĝanta en la homa komuniĝo, troviĝas en la stato de dinamika ekvilibro, inkluzivanta elementon de malekvilibro. Dank' al efiko de eksteraj

kaj internaj faktoroj, konstante okazas mikroskopecaj ŝanĝiĝoj de parametroj, konsistigantaj tiun sistemon, al kiuj la sistemo malrapide kaj laŭgrade reagas per redistribuo de valoroj de siaj elementoj kaj, finfine, per rearanĝo de sia strukturo. En tio, laŭ ni, konsistas la senco de la nocio de lingva evoluo.

Pri potenciala planlingvo, ne ricevinta komunikadan realigon, oni povas fari ĉiajn manipulojn. Sed kun akiro de komunikada realiĝo, eblo artefarite enmiksiĝi en la sistemon de la lingvo draste malpliigas. En tiu rilato, Esperanto, akirinta vastan aplikadon en diversaj sferoj, iĝis unika fenomeno inter la planlingvoj - memorganiziganta sistemo. Konforme al la lingva dialektiko, en ĝi komencis naskiĝi procezoj de spontana evoluo, kiun antaŭvidis F. de Saussure. La principo de evoluismo estis ekde la komenco fondita en Esperanto, ĉar Zamenhof intence kreis nur "embrion" de la lingvo, kiu estis transkreskanta en memorganizigantan sistemon per funkciado en la socio kaj kolektiva lingvokreado.

Stabileco de la etnaj lingvoj baziĝas sur ilia historia tradicio. Kiel analogo de la simila tradicio por Esperanto iĝis la kodigita fundamento, kiun difinis ĝia aŭtoro. La principo de fundamentismo baras la vojon al reformemo, sed kongruas kun la principo de evoluismo. La Akademio de Esperanto observas la evoluon de la lingvo kaj kodigas stabiliĝintajn fenomenojn.

Normeco de lingvo kaj spontaneco de ŝanĝiĝoj troviĝas en la rilatoj de inversa interdependeco. Tiu aserto rilatas ankaŭ al Esperanto, kiel al literatura, normigita lingvo. Malgraŭ la centjara evoluo, la fonetiko kaj gramatiko de Esperanto ne subiĝis al radikalaj ŝanĝiĝoj. Samtempe, en la procezo de funkciado, en Esperanto, same kiel en ĉiu alia lingvo, okazas certaj ŝanĝiĝoj, kiuj estas detale montritaj en la fino de la unua ĉapitro.

La dua ĉapitro "Kontribuo de la rusa lingvo al la sona kaj gramatika strukturo de Esperanto" estas dediĉita al konfronto en la fonologio, fonetiko kaj grafiko, morfemiko, afiksado, vortkunmetado, morfologio kaj sintakso de la du lingvoj kaj al eltrovo de komuneco de elementoj kaj modeloj.

La Esperanta fonemaro estas proksima kopio de la rusa fonemaro, en kiu estas reduktita la pozicia variado. La vokalaro inkluzivas la samajn 5 fonemojn. La konsonantaro inkluzivas 23 fonemojn. Se ne atenti la opozicion laŭ moleco-dureco, do ĉiuj rusaj konsonantaj fonemoj havas analogojn en Esperanto, kio ne estas direbla pri la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj.



Pro la premo de la fonologiaj sistemoj de la gepatraj lingvoj, ĉe esperanto-parolantoj la diapazono de libera variado de fonemoj estas tre vasta. Malgraŭ tio, en la lingvo aperis pli-malpli stabilaj ortoepiaj (prononcaj) normoj, unu el kiuj estas foresto de fonologia neŭtraliĝo. Tiu stabileco klariĝas unuavice per konscieco de alproprigo kaj uzado de la lingvo en la internacia kolektivo. Fonetike Esperanto estas sufiĉe proksima al la rusa lingvo, kvankam estas ankau diferencoj.

Malgraŭ tio, ke Esperanto uzas la latinan alfabeton, kaj la malproksima etimologio de la plejparto de la vortoj originas el romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, grafika formo de multaj internaciaj vortoj memorigas ne tiom iliajn etimologiajn modelojn ~~kiom~~ (donataj sube en parentezoj), kiom praktikan transskribon de analogiaj rusaj vortoj per la rimedoj de la latina alfabeto: trotuaro (trottoir), ŝoseo (chaussée), ŝnuro (Schnur).

Kiel materialo por konstruado de Esperanto servis romanaj, ĝermanaj kaj slavaj lingvoj. Tamen ĝia morfemiko distingiĝas per tendenco al aglutineco: la morfemoj karakteriziĝas per standarteco de formo kaj de semantiko kaj per libereco de kombiniĝo. Aliflanke, Esperanto ne posedas aron da ecoj, karakterizaj por etnaj aglutinaj lingvoj. En la disertacio estas proponata hipotezo, ke kiel modelo por la aglutinoida strukturo de Esperanto, certgrade, servis la riĉa afiksado de la rusa lingvo kombine kun konsekvenca apliko de analogio lige kun aspiro doni al la planlingvo simplan morfologian strukturon.

Kiel notas en siaj rememoroj Zamenhof, la rusa lingvo atentigis lin pri grandegaj ebloj de afiksado por redukto de la leksikono de Esperanto. Konfrontante rusajn derivaĵojn, li difinis la semantikon de multaj afiksoj kaj signis ĉiun derivacian signifon per afikso, havanta optimume internacian formon. La sistema aplikado de la principo de reguleco sugestis al li la ideon doni al ĉiu afikso nur unu formon kaj nur unu signifon. Tiamaniere, la lingvo fariĝis aglutina sur la nivelo de derivado. Laŭ analogio, la principo de standartigo de morfemoj estis etendigita al la radikaj kaj relaciaj morfemoj, t.e. aglutinado estis etendigita al la tuta nivelo de morfemiko. Same kiel la sumo de derivaciaj afiksoj donas kompleksan derivacian semantikon, la sumo de relaciaj afiksoj ekdonis kompleksan relacian semantikon. Sed Zamenhof iris plu: se ĉiuj morfemoj estas forme kaj semantike standartaj, do la formo kaj semantiko de la vorto estas simpla sumo de la formoj kaj semantikoj de ĝiaj elementoj,

t.e. la relacia (vortrilatiga) hierarĥio kaj la derivacia (vortoderiva) hierarĥio en la sintagmatiko de la vorto reduktiĝas al la kompozicia (vortokunmeta) hierarĥio. La prezentita hipotezo ebligas klarigi la aglutinan tendencon en Esperanto per ĝia geneza-tipologia komuneco ~~de la rusa lingvo kun la rusa lingvo~~ kun la rusa lingvo en kombino kun apliko de reguligo. Ĝi konfirmiĝas per facileco de pomorfema tradukado en Esperanton de multaj rusaj vortoj, havantaj po kelkajn afiksojn.

Afiksado ludas en Esperanto tre gravan rolon, ĉar ĝi ebligas konstrui derivitajn vortojn el primitivaj morfemoj same facile, kiel konstruiĝas liberaj sintaksaj kombinoj el vortoj. Grado de internacieco de formo de afiksoj estas multe malpli alta, ol grado de internacieco de radikoj. Se konsideri, ke Zamenhof donis al la sufiksoj unuecigitan formon (komenco per vokalo, fino per konsonanto), fariĝas klare, ke rekoneblo de la Esperantaj sufiksoj estas malgranda kompare kun rekoneblo de la internaciaj radikaj morfemoj. Sendepende de origino, la Esperantaj afiksoj vivas per aŭtonoma vivo: posedante preskaŭ nelimititan produktivecon, ili formas multege da vortoj, por kiuj ne ekzistas analogoj kun la sama afikso en la lingvo - fonto de tiu afikso. Plue en la disertacio estas konsiderataj Esperantaj afiksoj laŭ malpliigo de ilia materiala kaj semantika ligo kun la rusa lingvo.

Ekzemploj:

Sufikso -il- (instrumento, rimedo) estas formita el la rusa sufikso -l-. Kuniĝante kun radikaloj de certa tipo, tiu rusa sufikso donas formanton, kiu koincidas kun la formanto de analogiaj Esperantaj vortoj: merilo - mezurilo, svetilo - lumilo. Tiu sufikso en la rusa lingvo estas uzata ankaŭ kun alitipaj radikaloj, kie la kombinaĵo "il" mankas: pugalo - ~~timigilo~~, metla - balailo. Estas eventuala apogo sur proksimajn laŭ formo analogojn el la germana kaj franca lingvo: Schlüssel - ŝlosilo, outil - instrumento.

Sufikso -an- (loĝanto, membro, adepto) devenas de la origine rusaj sufiksoj -anin kaj -anec kaj de la internacia sufikso, prezentita en diversaj lingvoj per proksimaj formoj: urbano - goroĵanin, amerikano - amerikanec, rusujano - rossijanin.

Prefikso dis- (disigo) estas prenita el la latina lingvo. En la rusa lingvo ĝi renkontiĝas en la komenco de kelkaj depruntitaj vortoj: dislokaciĵa, disseminaciĵa. Ĝi estas enkondukita kiel analogo de la rusa produktiva verba prefikso raz-/ras- kun la samaj semantikaj nuancoj: disbati - razbit', dispeli -

razognat', disflori - rascvesti, disduiĝi - razdvoit'sja, disfali - raspast'sja. La romanaj kaj ĝermanaj lingvoj ne posedas regulan eblon formi analogiajn vortojn. Preskaŭ ĉiuj vortoj, uzitaj de Zamenhof en la unua rusa-esperanta vortaro, paŭsas (kopias) analogiajn rusajn vortojn. En tiu vortaro estas ankaŭ da arĥaismoj, kiuj paŭsas ankaŭ la idiomecan semantikon de la respektivaj rusaj derivaĵoj: disfari - razdelat', dislasi - raspuskat', displugi - raspaĥat'.

Prefikso ek- (agokomenco aŭ momenta ago) estas kreita kiel semantika analogo de la vaste uzataj rusaj inkoativaj (signifantaj agokomencon) prefiksoj. Ekzemploj el la unua rusa-esperanta vortaro de Zamenhof: ekfumi - zakurit', ekŝviti - vspotet', ek-tremi - vzdrognut'. En la sama vortaro Zamenhof, inter tradukoj de la prefikso vz-/vs-, donas ek-. La angla kaj la romanaj lingvoj ne posedas prefiksojn kun la sama semantiko, kaj la germana lingvo uzas ilin multe malpli ofte ol la rusa.

La analizo montras, ke plejparto de la Esperantaj afiksoj originas el propraj, internaciaj aŭ depruntitaj afiksoj de la rusa lingvo, kio manifestiĝas en ilia formo kaj semantiko.

Esperantaj vortkunmetaĵoj, formitaj surbaze de vortkombino, kun la unua elemento - duonprefikso plej ofte estas konstruataj laŭ modeloj de rusaj vortoj kun prefiksoj aŭ kun prepozicioj-prefiksoj, havantaj la saman semantikon, kiel la unua parto de la Esperantaj vortkunmetaĵoj (kelkaj el tiuj modeloj estas ankaŭ en aliaj lingvoj). La duonprefikso reflektas la semantikon de la Esperanta prepozicio, sed iufoje ĝi ŝanĝas ĝin sub influo de flankaj signifoj de la rusaj analogoj, el kio rezultas, ke la semantiko de la vortkunmetaĵo ĉesas esti suma semantiko de ĝiaj elementoj kaj akiras idiomecon, kopiante la idiomecon de la respektivaj rusaj vortoj. Ekzemploj de la analizitaj modeloj:

El (iz) - I) ĉefa signifo "elinterne": eltiri - vytjanut', elbati - vybit', elirejo - vyĥod; 3) metaforaj signifoj: elpensi - vydumat', elteni - vyderĵat', elturniĝi - vykrutit'sja, elsaltulo - vyskoĉka; 3) idiomoj: eldoni - izdat', elpendaĵo - vyveska, inter ili arĥaismiĝintaj: elrigardi - vygljadet', eldividi - vydelit', elsidi - vysidet'; 4) signifo de agofiniteco: elaŭskulti - vysluŝat', ellerni - vyuĉit', elĉerpi - isĉerpat'; en la lasta signifo uzo de la duonprefikso el- limiĝas nur je negranda aro da vortoj, ĉefe tiuj, kiuj estas paŭsitaj kun tiu signifo el la rusaj vortoj.

Pri (o) - la semantiko de tiu prepozicio malforte reflektiĝas en vortkunmetaĵoj: pripensi - obdumat', prisilenti - umolĉat'. Pli ofte, paŭsante rusajn vortojn, tiu duonprefikso signifas transigon de la ago de la subjekto al la objekto: pripagi - oplatit', priridi - osmejat'.

Sub (pod): subakva - podvodnyj, subfosi - podkapyvat'; metaforemaj: subdividi - podrazdeljat', subkompreni - podrazumevat'; idiomecaj kun la signifo "kaŝe": subaŭskulti - podsluŝat', subrigardi - podsmotret', subaĉeti - podkupit'.

La teorio de la Esperanta vortfarado, kodigita de la Akademio de Esperanto, taŭgas ankaŭ por analizi vivantajn procezojn de vortkunmetado en la rusa lingvo. Rusaj vortkunmetaĵoj, formitaj laŭ ĝiaj principoj, estas facile paŭseblaj en la Esperantaj kaj servis kiel modeloj por la Esperanta vortkunmetado: linfibro - l'novolokno, legomkonservejo - ovoŝĉeĥraniliŝĉe, laborkapabla - rabotosposobnyj, metaltranĉa - metallorefuŝĉij.

En la sekcio "Morfologio" estas studata kontribuo de la rusa lingvo al la sistemoj de la paradigmaj klasoj, substantivo, adjektivo, verbo, pronomo, adverbo, korelativaj vortoj, numeralo, prepozicio kaj konjunkcio.

La ĉefaj paradigmaj klasoj estas markataj en Esperanto per specifaj indikiloj (vokaloj), kiuj esprimas relacian (rilatigan) signifon de la vorto. Ligiteco de la formo de tiuj indikiloj kun formoj en naciaj lingvoj havas nur partan karakteron, ĉe kio ligiteco kun rusaj formoj estas sufiĉe videbla. La indikiloj de la paradigmaj klasoj, krom la relacia, aktualiga kaj limiga funkcioj, plenumas ankaŭ derivacian funkcion, estante transpoziciiloj, transpoziciantaj vortojn el unu paradigma klaso en alian.

La kaza sistemo de la nominativo konsistas el du kazoj - nominativo kaj akuzativo. La signifoj de la aliaj kazoj estas esprimataj analize helpe de prepozicioj kombine kun formo de nominativo. Oni povas aserti, ke la fonto de la kategorio de akuzativo estas la rusa lingvo kun apogo al la germana kaj latina lingvoj. Same kiel en la rusa lingvo, la Esperanta akuzativo, krom la ĉefa objekta signifo, esprimaj periferiajn adjektajn signifojn, inter ili de direkto.

Dank' al siaj ebloj de vortfarado, Esperanto, simile al la rusa, estas pli riĉa je relativaj adjektivoj, ol la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, kiuj ofte uzas prepoziciajn konstruojn. Laŭ la modelo de la rusa lingvo, la adjektivo akordiĝas kun la substantivo.

La formoj de la verbo en Esperanto esprimiĝas per minimuma aro da morfologiaj indikiloj, sed ili ebligas al la verba sistemo adekvate funkcii en diversaj cirkonstancoj.

La verba sistemo de Esperanto konsistas nur el tri sintezaj formoj de tenso. Tie ĉi, sendube, decidan rolon ludis la modelo de la rusa lingvo, ĉe kio la rusa analiza formo de futuro ne reflektiĝis en Esperanto.

Aliflanke, bazante sin sur ekstera simileco de konstruoj, okcidentaj esperantologoj kreis, laŭ la modelo de la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, teorion de akcesoraj kompleksaj tensoformoj en Esperanto. Ĝia esenco konsistas en tio, ke la verbo povas esti uzata en analiza formo kiel kombino de la konjugata helpa verbo ESTI kaj participo de ĉia voĉo kaj tenso. Sed ĉar la konjugata elemento ĉi-kaze estas nesufiĉe gramatikiĝinta, ĝi ludas la rolon de kopulo, sed ne de helpa verbo. La analizaj formoj estas nura predikativa konstruo, t.e. participa kompleksa predikato. Tiaj vortokombinoj estas kutimaj por la rusa lingvo, ekzemple: kniga byla proĉitana, kniga byla ĉitajema. La Esperantaj analogoj: la libro estis legita, la libro estis legata. Same konstruiĝas laŭ analogio la formoj kun ĉa aktivaj participoj, kiaj mankas en la rusa lingvo.

La aspekta sistemo de la verbo estis fondita en Esperanto laŭ la modelo de la rusa kaj pola lingvoj. La leksika-semantika kategorio de ag-manieroj ekzistas ankaŭ en la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, sed morfologie ĝi esprimiĝas nur sporade (kelkaj germanaj prefiksoj). Kiel konate, la iam riĉa sistemo de tensoformoj de la rusa verbo iom post iom atrofiĝis. Por esprimi nunancojn de ago la rusa lingvo evoluigis la kategorion de aspekto. Esperanto troviĝis en simila situacio kaj ankaŭ evoluigis la kategorion de aspekto. Tio plifaciliĝis pro tio, ke la kategorio de aspekto jam estis en la rusa lingvo. Estas notinde, ke la kategorio de aspekto en Esperanto troviĝas en la stadio de formiĝo kaj ne esprimiĝas tiel nete, kiel en la rusa lingvo.

La aspekto en Esperanto, simile al la rusa lingvo, esprimiĝas per morfologiaj rimedoj (verba aspekta derivacio) kaj per morfologiaj-sintaksaj rimedoj (participa kompleksa predikato, en kiu la kopulo "esti" esprimas tensan signifon, kaj la predikativa membro - participo- esprimas aspektan signifon per participa aspekta derivacio).

Plejparto de la Esperantaj senafiksaj verboj estas duaspektaj. Ilia aspekta signifo manifestiĝas per kunteksto aŭ per

leksikaj rimedoj. Pro sia nemarkiteco, kio opoziciigas (kontraŭmetas) ilin unuavice al la prefiksaj perfektivaj verboj, la duaspektaj verboj tendencas uziĝi en tiuj kazoj, kiam ne estas bezono emfazi ilian perfektecon. Alivorte, ili asociiĝas kun ~~la~~ la signifo de la <sup>im</sup>perfektiva aspekto; ~~la~~ kvankam povas uziĝi ankaŭ kun la signifo de la imperfektiva aspekto: fari. Inter la senafiksaj verboj distingiĝas grupo de senlimaj verboj de absolute imperfektiva aspekto (memori, ami, stari) kaj grupo de verboj de precipe perfektiva aspekto kun la signifoj de momenta aŭ unufoja ago (fali, forgesi).

Perfektivaj verboj formiĝas de duaspektaj kaj imperfektivaj verboj per kelkaj manieroj. La ago-komenca subaspekto formiĝas per la prefikso ek-, kiu estas semantika analogo de kelkaj rusaj aspektaj verbaj prefiksoj: ekvoli "zaŝtet'", ekami - "poljubit'", ekvidi "uvidet'".

Por signi la ago-finan subaspekton, Esperanto ne posedas unu morfologian indikilon kaj, ĉe neceso, uzas ĝiajn surogatojn en la formo de duonprefiksoj: ellerni - izuĉit', finkanti - spet' ktp. Ankaŭ tiu ĉi rimedo de perfektivigo baziĝas sur modelo de la rusa lingvo, kie mankas regula indikilo de la ago-fina subaspekto, sed estas uzata granda aro da verbaj prefiksoj/ Aliflanke, en Esperanto, same kiel en la rusa lingvo, preskaŭ ĉiuj vortfaradaj prefiksoj, krom la derivacia signifo, havas ankaŭ ago-finan kromsignifon. Tio reduktas bezonon pri speciala pure aspekta prefikso.

Alia rimedo por signi ago-finan perfektivigon estas uzado de konstruoj de participa kompleksa predikato kun la predikativa membro - aktiva aŭ pasiva participo en preterito: la libro estis legita - kniga byla proĉitana, mi estis leginta la libron - ja proĉital knigu. Por la lasta formo en la rusa lingvo mankas analogo: "ja byl proĉitavšim" estas gramatike korekta, sed ne uzata konstruo.

Imperfektivigo en Esperanto efektiviĝas regule helpo de la sufikso -ad-, kiu kopias la respektivan regulan rimedon de imperfektivigo de la rusa lingvo per la sufiksoj -iva-/-yva-/-va-/-a-. Simile al la rusa lingvo, ekzistas imperfektivigo de senprefiksaj perfektivaj verboj (trompi - obmanut', trompadi - obmanyvat'); imperfektivigo de sufiksaj verboj, motivitaj de substantivoj kaj adjektivoj (ŝtoniĝi - okamenet', ŝtoniĝadi - okamenevat'); kaj ankaŭ sekundara imperfektivigo de prefiksaj perfektivaj verboj, motivitaj de senprefiksaj verboj: kreski - rasti, elkreski - vyrasti, elkreskadi - vyrastat'.

Zamenhof kaj unuaj Esperantaj aŭtoroj tro ofte uzadis la aspektajn afiksojn ek- kaj -ad-, strebante, sub premo de la gramatika sistemo de la rusa lingvo, doni al duaspektaj verboj formajn indikilojn de la kategorio de aspekto eĉ en la kazoj, kiam la kunteksto ne donas pretekstojn por dubi pri la aspekta signifo de la verbo.

Kio koncernas la kategorion de modo, influo de la rusa lingvo estas videbla en tio, ke la kondicionalo en Esperanto ne havas tenso-formojn.

Laŭ la modelo de la rusa lingvo, la Esperantaj verboj nete dividiĝas en transitivajn kaj netransitivajn. Diference de la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, ili ne havas transitivecan homonimion. Sub influo de naciaj lingvoj kaj pro tio, ke en Esperanto la rekta komplemento povas iufoje anstataŭi nerektan komplementon, ĉe pluraj Esperantaj verboj estas observebla hezito inter aparteno al la transitivaj kaj nerekte-transitivaj verboj: danki (al), esperi (al, pri).

Plejparto de la Esperantaj verboj koincidas laŭ transitiveco-netransitiveco kun la analogiaj rusaj verboj. En ambaŭ lingvoj netransitivaj verboj transformiĝas en la transitivajn helpe de analogiaj prefiksoj: travivi - proĵiti', prilumi - osvetiti'. En Esperanto por tio estas uzata ankaŭ la faktitiva sufikso, kio havas ~~manan~~ lokon en la rusa lingvo malofte: trinkigi - poiti'. Transitivaj verboj transformiĝas en netransitivajn helpe de la refleksiva sufikso -iĝ- laŭ la modelo de la rusa postfikso -sja: detruiti - razruŝiti', detruigi - razruŝiti'sja.

La ĉefa rimedo por formi pasivajn verbojn en Esperanto estas kombino de la verbo "está" kun pasiva participo, kio estas karakteriza ankaŭ por la rusa lingvo: la libro estis legita de studento - kniga byla proĉitana studentom. Sed en la rusa lingvo la ĉefa rimedo por formi pasivajn verbojn estas la postfikso -sja, kio kopiĝas en Esperanto per la analogia sufikso -iĝ-: tiu formo uziĝas ofte - eta forma upotrebljaetsja ĉasto.

La rusa lingvo influis al la vasta uzado en Esperanto de verboj en mediala voĉo, kie la analogo de la postfikso -sja estas denove la sufikso -iĝ-: la ŝtono ruliĝas - kamen' katitsja. Imite al la rusa lingvo la mediala formo estas ofte uzata anstataŭ la aktiva formo kun la refleksiva pronomo: laviĝi anst. lavi sin.

Esperanto ne nur transprenis la kvarmembran sistemon de la rusaj participoj, sed ankaŭ aldonis al ĝi du formojn de futuro,

formitajn laŭ analogio. La participoj kaj gerundioj konservas la aspekton de la verbo, de kiu ili estas formitaj: en la kodigita "Fundamenta gramatiko" Zamenhof donas tiajn tradukojn de la participoj en la rusan lingvon: faranta - delajuŝĉij, farinta--sdelavŝij, farata - delajemyj, farita - sdelannyj. Tiu neambigua, kvankam implicita, indiko pri ekzisto de la kategorio de aspekto konfirmiĝas per la komuna uzado de Esperanto, kion kodigis la Akademio de Esperanto. Simile al la rusa lingvo, en Esperanto ĉiam estas markitaj la diferencoj inter la de-verba adjektivo kaj participo (danca-dancanta), inter la participo kaj gerundio (leganta-legante).

Kontribuo de la rusa lingvo manifestiĝas en la formo de kelkaj pronomoj kaj ankaŭ en ilia finalo je -i, analogie al la rusaj pronomoj kun la finalo je -i/-y: ni - my, vi - vy, ili - oni.

Esperanto estas pli riĉa je derivitaj adverboj, ol la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, kio havas paralelon en la rusa lingvo. Simile al la rusa lingvo, sed morfologie pli nete, Esperanto distingas la adverbojn de loko kaj direkto: supre - vverĥu, supren - vverĥ.

Specialan grupon konsistigas en Esperanto la sistemo de korelativaj vortoj (pronomoj kaj pronomaj adverboj), servanta ĉiam por esprimi la nociojn de objekto kaj de ĝia individuigo, kvalito, loko, direkto, tempo, kvanto, agmaniero, kaŭzo kaj aparteno. Ĝi estas bazita sur la modelo de la rusa lingvo, kvankam havas krome malpli evidentajn analogojn en aliaj lingvoj, sed plenigo de malplenaj ĉeloj laŭ la principo de reguleco alkondukis ĝin ĝis logika perfekteco. La sistemo estas reto de semantikaj multiplikantoj, ĉe kio la komenca parto de tri el kvin kategorioj (demandaj-rilataj, montraĵaj kaj neaj korelativaj vortoj) regule kunrilaras kun la komenca parto de la analogiaj rusaj vortoj: kiu - kto, tiu - tot, neniu - nikto ktp.

La prepozicioj posedas malaltan gradon de internacieco kaj estas selektitaj en Esperanton el apartaj lingvoj. Senpere el la rusa lingvo originas jenaj prepozicioj: krom - krome, po - po, pri - o (formomezigo de la rusaj "pri" kaj "pro") kaj ankaŭ la sensemantika prepozicio "je" (de la rusa esprimo jej-bogu! - je dio!). Al ĉiuj primitivaj simplaj prepozicioj de la rusa lingvo en iliaj ĉefaj signifoj konformas en Esperanto analogiaj prepozicioj, kio, nature, ne estas hazarda. Laŭ la modelo de la rusa lingvo, Esperanto formas kompleksajn kaj kunmetitajn prepoziciojn: el sub, kune kun, depende de k.a.



La kontribuo de la rusa lingvo precipe vaste manifestiĝis en la sintakso. Zamenhof kaj plejparto de la unuaj aŭtoroj estis parolantoj de la rusa lingvo (kelkaj ankaŭ parolantoj de la proksima al ĝi pola lingvo). Kiam ili verkadis en Esperanto, ili subkonscie (laŭ interferenco) transformadis la Esperantan sintakson en proksiman kopion de la rusa sintakso. Tiel estis establitaj la sintaksaj normoj, kiuj firmiĝis en la komuna uzado. En la disertacio estas citataj 18 specifajoj de la Esperanta sintakso, kiuj unuigas ĝin kun la rusa lingvo kaj diferencigas de la pliparto de la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj. Ekzemple:

- plena akordiĝo de la determinanto, esprimita per la paradigma klaso de adjektivoj, kun la determinato, esprimita per la paradigma klaso de substantivoj: Sed neniam ŝi forgesos la belegajn arbojn, la verdajn montetojn kaj la malgrandajn infanojn...;

- libera ordo de la partoj de propozicio: Sed pri ŝia fratino mi povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si;

- koincido de la rimedoj de esprimo de la aktuala (informoporta) divido de la propozicio: La direktoro donos respondon al tiu demando morgaŭ. Morgaŭ la direktoro donos respondon al tiu demando. Morgaŭ al tiu demando donos respondon la direktoro;

- manko de akordiĝo de tensoj en la kompleksa subordita frazo: Ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon;

- uzo ~~na~~ en senpersonaj propozicioj de predikativaj vortoj en la formo de adverboj; estas varme, estas necese, estas ordonite veni.

En la tria ĉapitro "Kontribuo de la rusa lingvo al la leksiko de Esperanto" estas studataj jenaj demandoj: formiĝo kaj riĉiĝo de la Esperanta leksiko, klasifiko de la Esperanta leksiko laŭ ĝia komuneco kun la leksiko de la rusa lingvo, semantiko kaj frazeologio.

La Esperanta leksiko baziĝas sur konscia selekto de elementoj, komunaj al la lingvoj-fontoj. Tiu modeloj varias en la lingvoj-fontoj laŭ formo kaj semantiko. La modelo, maksimume proksima laŭ la grafika kaj sona formoj kaj proksima laŭ semantiko al la Esperanta radika morfemo, nomiĝu rekta, dum tiu, havanta deviojn en la formo kompare kun la rekta modelo, nomiĝu apoga modelo. La modelo, koincidanta laŭ la formo, sed kies semantika kampo ne koincidas eĉ parte kun la semantika kampo de la Esperanta radiko, kvankam proksimas al ĝi, nomiĝu modelo kun

semantika ŝoviĝo (angle: shift, france: glissement, germane: Gleiten, ruse: sdvig). Ekzemple, kiel rekta modelo de la vorto "domo" estas la rusa vorto "dom", dum la latina "domus" (hejmo) kaj la germana "Dom" (katedralo, kupolo) estas rektaj modeloj kun semantika ŝoviĝo. La modelo en la formo de libera (neligita) radiko, plene koincidanta kun la Esperanta radiko laŭ la formo kaj semantiko, nomiĝu ideala: por la vorto "tri" ĝi estas la rusa vorto "tri", ĉar respektiva kombino renkontiĝas en la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj nur kiel ~~maligita~~ ligita (angle: bound) elemento de la vorto.

La kalkulon de la komuneco en la sfero de leksiko inter Esperanto kaj la rusa lingvo ni faris laŭ la kodigita "Baza Radikaro Oficiala" (BRO), kiu estas la listo de la plej uzataj primitivaj vortoj, t.e. estis kalkulata la komuneco de la leksika kerno de Esperanto kun la leksiko de la rusa lingvo en sinkroneco (en la nuna stato). Tiu listo enhavas 2389 diversajn elementojn. El la kalkulo estas eliminataj 69 elementoj (afiksoj, propraj nomoj kaj dublaj formoj), kio rezultigas 2320 radikajn vortojn, t.e. ĉirkaŭ duono de la kodigitaj (oficialigitaj) radikaj vortoj. Do la selektitaĵo estas reprezenta.

Laŭ la karaktero de la komuneco kun la rusa lingvo la Esperantaj radikaj vortoj estas dividitaj de ni en 9 grupojn:

1. La vortoj, prenataj senpere el la rusa lingvo (kelkaj samtempe el la pola): bani, banto, barakti, brovo, bulko, celo, ĉapo, ĉerpi, deĵori, domo, funto, gladi, kaĉo, klarneto, klopodi, krano, krom, kruta, nepre, nu, paŝti, plugi, po, prava, pri, sva-ti, tri, vosto - entute 28 vortoj, aŭ 1,2%.

2. La vortoj, kies radiko plene koincidas kun la rusa radiko, ekzemple: aktiva, bileto, centro, deklari, efektiva - entute 622 vortoj, aŭ 26,8%;

3. La vortoj kun minimumaj diferencoj inter la radikoj, dum la formo en la aliaj lingvoj ne estas pli proksima, ol en la rusa, ekzemple: ĉokolado, kostumo, pejzaĝo, ŝoforo, vi - entute 30 vortoj, aŭ 1,3%.

4. La vortoj kun minimumaj diferencoj inter la radikoj, dum formo en iu lingvo estas pli proksima, ol la formo en la rusa lingvo, ekzemple: abrikoto, bulvardo, heroo, januaro, serioza - entute 59 vortoj, aŭ 2,5%.

5. La vortoj kun etaj diferencoj inter la radikoj, dum ne-niulingva formo estas pli proksima al la Esperanta, ol la rusa, ekzemple: cigaredo, koverta, meblo, poŝto, ŝtranga - entute 30 vortoj, aŭ 1,3%.

6. La vortoj kun etaj diferencoj inter la radikoj, dum la formo en iu lingvo estas pli proksima, ol en la rusa, ekzemple: bafsteko, gasto, komitato, rimeno, sukero - entute 139 vortoj, aŭ 6,0%.

7. La vortoj kun plena koincido aŭ kun minimumaj diferencoj kun la ligitaj elementoj de la rusaj vortoj, ekzemple: aero, blonda, folio, korespondi, radiko - entute 359 vortoj, aŭ 15,5%.

8. La vortoj kun etaj diferencoj kompare kun la ligitaj elementoj de la rusaj vortoj, ekzemple: dento, herbo, popolo, ripeti, trudi - entute 97 vortoj, aŭ 4,2%.

9. La vortoj, kies komuneco estas rekonebla nur kun peno aŭ per etimologia analizo, aŭ komuneco mankas - entute 956 vortoj, aŭ 41,2%.

Rektajn modelojn en la rusa lingvo havas la vortoj, apartenantaj al la grupoj 1,2,3,5,7 - entute 1069 vortoj, aŭ 46,1%. Apogajn modelojn havas la vortoj, apartenantaj al la grupoj 4,6,8 - entute 295 vortoj, aŭ 12,7%. Entute, la vortoj el la tavolo de la plej uzata leksiko, havantaj modelojn en la rusa lingvo estas 1364, aŭ 58,8%. Tiu kontribuo reflektas ne la genezan komunecon, kiel ĝin komprenas la kompara-historia lingvistiko, sed la interlingvistikan nocion de la geneza komuneco de elementoj ~~na~~ rezulte de selektado kaj depruntado.

Nemalofte romanaj kaj ĝermanaj vortoj estis enprenataj en Esperanton sub influo de la semantiko de la respektivaj rusaj vortoj, ekzemple: "aboni" estas uzata en la sencoj "aranĝi abonon" kaj "ricevadi abone"; "el" estas uzata en kombinoj de la tipoj "krono el floroj", "fari el amo"; "gargari" ne nur la buŝon (gorĝon), sed ankaŭ la teleraron; "ĝentila", kiu france signifas "afabla"; "laŭ" (de la germana "laut") plivastigis siajn semantikon kaj distribuiĝon (kombineblon) konforme al la rusa prepozicio "po"; "vigla" ricevis la semantikon de la rusaj vortoj "bodryj, oĝivljonnyj", sed ne de la franca "vigilant", kiu signifas "observeme atenta". Estas donitaj pli ol 30 tiaspecaj ekzemploj.

Plue estas detale konsiderata la funkciado en Esperanto de la vortoj, prenataj senpere el la rusa lingvo, kaj estas farata la konkludo, ke ili plene adaptiĝis en Esperanto, akiris novajn signifojn kaj asociojn, novajn derivaĵojn kaj kunmetaĵojn, iĝis nemalhavebla parto de la lingvo, ekzemple: ĉerpi, ĉerpeto, ĉerpilo, deĉerpi, ekĉerpi, elĉerpi, elĉerpita, subĉerpi.

Plue en la ĉapitro estas ekzamenataj ĝeneralaj demandoj de la Esperanta frazeologio kaj estas donataj ekzemploj de Esperantaj proverboj, kreitaj sub influo de rusaj ekvivalentoj.

La postparolo entenas konkludojn. La farita analizo montris konsiderindan genezan kaj genezan-tipologian komunecon de Esperanto kun la rusa lingvo, dank' al kio la strukturoj de ambaŭ lingvoj estas tipologie proksimaj unu al la alia. Nome pro tio studado de Esperanto ne prezentas grandajn malfacilaĵojn por la parolantoj de la rusa lingvo. Konsciigo pri tiu proksimeco estas premiso por plua benefika influo de la rusa lingvo al Esperanto, al kio devas kontribui unuavice ruslingva<sup>v</sup> esperantistoj. Aliflanke, al neniu etna lingvo la rusa lingvo kontribuis, nek povas kontribui tiel multe, kiel al la planlingvo Esperanto (almenaŭ en la sferoj de la gramatiko, vortfarado kaj fonologio). Studado de tiu unika fenomeno povas esti utila por la teorio kaj praktiko de la lingva konstruado (planado), por prognozado de la influo de la rusa lingvo, kiel lingvo de interpopola komuniĝo, al la aliaj lingvoj de Sovet-Unio.

#### REFERENCJOJ

<sup>1</sup> Aĥmanova O.S. k.a. O toĉnyĥ metodaĥ issledovaniĥa jazyka (Pri ekzaktaj metodoj de lingvoesplorado). - Moskvo, 1961, p. 23.

<sup>2</sup> Duc Goninaz M. Les influences slaves en espéranto. - In: Cahiers de linguistique, d'orientalisme et de slavistique (Institut de linguistique générale et d'études orientales et slaves. Université de Provence). AixMarseille, 1974, N° 3-4, p. 31-53; Gregor D. La fontoj de Esperanto. - Glasgow: Kardo, 1982; Dall'Acqua V. Influenze del russo sull' esperanto. - In: Revista italiana de esperanto, 1963, N° 2, p. 10-17.

<sup>3</sup> Blanke D. Karl Marx kaj Friedrich Engels pri la "langue universelle". - In: Der Esperantist, 1983, N° 6 (122), p. 125.

Ricevita 1987 03 17